
# BONA ESPERO



Rundbrief für Freunde, Förderer und Mitglieder
des Fördervereins "Bona Espero" e.V.

Cirkulero por amikoj, subtenantoj kaj membroj
de la "Subtenanta Asocio de BE" e.V.

n-ro 19 Majo 1987

Ktoj: Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60 Kto-nr. 900 826 BONA ESPERO
Postgiro-Amt Dortmund: BLZ 440 100 46 Kto-nr. 2033 99-465

---

Unu tasko malpli! "Onklino Ursula, venu kun alumetoj por fari lumon," sonis ĉiuvespere almenaŭ sepfoje, ĉar tiom da dormoĉambroj estas en la infandomo. Kaj nun? Movante ŝaltilon lumujo forigas la krepuskan malhelon, miraklo, al kiu la infanoj ne jam tute povas alkutimiĝi. Ek de la 14a de aprilo, la naskiĝtago de L.L. Zamenhof, akvoforto produktas elektran kurenton: denove la vivo fariĝis iom pli facila en BONA ESPERO!

Sed kiom da laboro necesis! Dum du semajnoj laboregis Giuseppe Grattapaglia kun du viroj kaj tri knaboj por konstrui betonajn fundamentojn por la turbino kaj la akvosistemo. Li cementis parton de la kanalo, instalis 48 metrojn da tricolaj akvotuboj kaj faris aliajn preparajn laborojn. Dume ne estis akvo en la domoj kaj ĉiuj aliaj devis vivi kiel la indianoj ĉe lagobordo. Tie ili lavis vestaĵojn, litotukojn, potojn, telerojn kaj infanojn. Oni ŝarĝis ujojn kun pluraj cent litroj da akvo por lavi la areon de 500 kvm domo, 200 kvm lernejo, 200 kvm pionira domo kaj la 56 de la dometo. "Nun vi iom eble povos per granda imago senti, kiajn fortojn ni streĉas, ke fine eklumu al ni," finas Ursula tiun parton de sia letero.

"Vi scivolas pri niaj estontaj planoj? Ni havas multajn kaj absolute ne estas la postulita sinsekvo, kiun mi vicigas: Trian akvopumpilon kun ĉirkaŭ 360 metrojn da akvotuboj ni devus instali. Tiam ni povas kreskigi legomojn ankaŭ dum la seka periodo. Jam ni duobligis la areon de la ĝardeno kaj kalkis la grundon. Do, antaŭpreparoj faritaj. Urĝas iom granda remizo, por protekti la traktoron kaj buseton, por rezerva ligno dum la pluvsezono kaj en aparta, fermita ĉambro ni povus konservi rizon, salon por la bovinoj, konstrumaterialon k.t.p. Nun tio kuŝas en ĉambro de la lernejo, sed tiun ejon ni urĝe bezonas por niaj 32 gelernantoj. Certe la bovinoj dankus per pli da lakto, se ni povus ŝirmi ilin per simpla tegmento dum la pluvsezono, kaj la pikdratbariloj ĝis nun ĉirkaŭas nur duonon de nia grundo. Ĉu iam konstrui gastodomon kun 5 dulitaj ĉambroj, apartaj duŝoj kaj kuirejo? La nuna solvo, kiel eble plej integrigi gastojn en nian grandfamilion ne ĉiam estas ideala. Sed nia ĉefa tasko kaj fakte en plena disvolviĝo restas la edukado kaj instruado de 32 infanoj. La plej aĝa knabino estas 13jara kaj la plej juna, Valdeci, 6jara. 18 infanoj loĝas en nia domo, 4 en la dometo, 7 en la pionira domo kaj 7 en Salto.
"Se mi sukcesos laŭ tempo-dispono, mi verkos artikoleton pri ĉiu infano, ke vi pli bone konu nin," finas Ursula sian lastan longan leteron!

Societaj novaĵoj! 65 jarojn atingis amiko de BONA ESPERO. "Mia plej granda deziro: nenion kunportu," li petis siajn gastojn, "nur se en subtegmentejo aŭ kelo kuŝas ankoraŭ ludiloj de vi aŭ viaj infanoj, ni povos kune plenigi paketon por la infanoj en BE." 28 aŭtoj, 13 pupoj, 9 ursoj, same multaj aliaj veluraj bestoj, amaso de bretludoj, premioj por infanfestoj kolektiĝis kaj eĉ la afranko por ekspedo de la amasoj. 4 paketoj estas intertempe survoje al Brazilo, iom pli ol la duono de la donacoj. Dum la ĉi-jara kristnasko la donaco-kesto de Ursula estos plena.
"Kiel oni fartas en BE?" 20 el la partoprenantoj de GERMANA KONGRESO kaj PASKA RENKONTIĜO en Rastatt aŭskultis kaj interŝanĝis novaĵojn dum kontaktkunveno de nia societo. Ĉu vi konas Telgte?
Rezervu jam nun la semajnfinon 21./22. 11. 1987 por nia jarĉefkunveno